

205 SIFRPO

El la enhavo:

100 jaroj de EK Prago
10-a ĈEA kongreso
Nova statuto
Kongresa rezolucio
Asocia biblioteko
KAEST 2002
Tomáš Pumpř
Novaj honoraj membroj

4
2002

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



100 jaroj de Esperanto en Prago
10-a kongreso de ĈEA

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),
rete Starto:

malovec.starto@clavis.cz.

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:**

cea.polnický@quick.cz (sekretario)

podhradská@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio. 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 250 Kč, B 150 Kč, D 70 Kč, E 70 Kč, F 5000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komentantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice. melicharkova@quick.cz

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

Sekcioj de ĈEA: junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informadiko

Komisionoj de ĈEA: ekzamena, gazetara-informa

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA:

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradská@volny.cz

Vicprezidanto (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio): Lucie Karešová, Havlíčkovovo nám. 1, 130 00 Praha 3, tel. 222 780 677

Vicprezidanto (komitatano A de UEA): Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz

Sekretario: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386

Komitatano (kluboj): Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257. hp@ohs.svitavy.cz

Komitatano (sekcioj): Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz

Kontrolgrupo de ĈEA: Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, tel. 466 401 942;

Věra Šlahařová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí nad Labem,

slaharova.v@kr-ustecky.cz;

Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@komercpoj.cz

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, starto@clavis.cz

Kontrollegis: V.Kočvara, M. Pastrňák, V. Podhradská, P. Polnický

Esperanto-muzeo: Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová, muzeum.ct@worldonline.cz

Abonoj de gazetoj: Vladislav Hasala, Dvořákova 1, 696 62 Strážnice, tel. 518 332 278, fakso 518 332 507, vlada_hasala@iol.cz

10-a kongreso de ĈEA

La jubilea kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (15.-17.11. 2002) realiĝis samtempe kiel soleno de 100 jaroj de la loka klubo. En la kulturcentro Zahrada en Praha-Chodov kunvenis ĉirkaŭ cento da personoj (gastoj loĝis en proksima studenthejmo Volha).

100-jariĝo de la Praga klubo

La vendreda programo estis dediĉita al la 100-jara jubileo de la praga klubo, por kies omaĝo estis en la vestiblo instalita ekspozicio, kiu tie restis ĝis la 22-a de novembro (la centron ĉiutage vizitas multe da homoj, precipe infanoj, por sporti aŭ labori en interesrondetoj), kaj Jiří Patera preparis broŝuron **Centjariĝo de la Esperantista klubo en Praha**. Bedaŭrinde li mem antaŭ vesper-manĝo kolapsis kaj estis transportita en hospitalon (sed li jam fartas bone). Por honori la pragan klubon aperis ankaŭ du novaj poemkolektoj: **Zdenka Bergrová**, *Vortoj de la Nokto*, kaj **Jiří Karen**, *Mondo afabla ne nur al vortoj*, ambaŭ en traduko de Jaroslav Mráz.

La solenan koncerton enkondukis kaj vorte akompanis Lucie Karešová. En la unua parto prezentis sin

rusa pianistino kaj komponistino, multfoje internacie premiita, vivanta jam kvin jarojn en Prago, **Jelena Puchova**. Ŝi kantis proprajn kantojn kaj prezentis ankaŭ Infanan Operon Praha kun fragmento el sia muzikalo *La eta princo* (la premiero de la ĉeĥa versio estas planata por printempo 2003 en la teatro Kolowrat, la esperantajn vortojn provizis Mikaelo Bronštejn).

En la dua parto de la koncerto Jelena Puchova plane akompanis la operkantistojn **Kateřina Kudlíková**, **Miroslav Smyčka** kaj **Josef Vích**, kiuj prezentis pecojn el operoj (ekz. Najado), operetoj (ekz. Lehár) kaj popolajn kantojn.



La kongresa traktado

La laboran parton de la kongresa programo gvidis sabate antaŭtagmeze Pavel Polnický. Post minuto da silento por niaj forpasintoj salutis la kongreson nome de la Germana Esperanto-Asocio Norbert Karbe.

Petro Chrdele preparolis la plenumadon de taskoj el rezolucio 1999 Tábor (deponejo por biblioteko, adapti la statuton al novaj leĝoj, fondi sekcion de informadiko, esplori intereson pri fondo de artsekcio, akiradi informojn de la kluboj).

Lucie Karešová klarigis la proponojn por ŝanĝi la asocian statuton. La partoprenantoj vive diskutis, aperis kelkaj atentigoj, demandoj, proponoj, fine la nova statuto estis aprobita post enigo de tri ŝanĝoj. La statuto estos registrita ĉe Ministerio pri Internaj Aferoj (la tutan version legu sur paĝoj 111-116).

La agadon de ĈEA dum la trijara periodo prezentis la asocia prezidantino Věra Podhradská (vidu apartan artikolon).

La asocian ekonomion kaj membrobazon priskribis Pavel Polnický. La asocio havas 942 membrojn (A 144, B 307, D 47, E 54, F 390), kies membrokotizoj donas nur 40 000 Kč (ne sufiĉas eĉ por eldoni Starton).

La entreprenistoj, kiuj donos al la asocio sponsoran donacon almenaŭ 1 000 Kč, povas ĝin dekalkuli de la impost-bazo.

Josef Hron prezentis la raporton de la kontrolgrupo.

Lucie Karešová informis, ke en 2002 estis 26 individuaj membroj de UEA el Ĉeĥio, kio estas tre malmulte.

La plej solena programero estis proklamo de novaj honoraj membroj: **Zdeněk Hršel, Miloslav Pastrňák, Jiří Patera, Jiří Pištorá, Věra Podhradská, Miroslav Smyčka** (vidu apartan artikolon).

La kulmino de la kongreso estis jam tradicie elektado de la asociaj organoj. La prezidanto de la elekta komisiono Kvido Janík unue priskribis la unujaran laboron de la komisiono kaj serĉadon de kapablaj kaj volontaj personoj. Unue li prezentis la kandidatojn por la kontrolgrupo (**Josef Hron, Jiří Souček, Věra Šlahařová**), kiuj estis akceptitaj per akklamo. Por la asocia komitato estis proponitaj naŭ kandidatoj (Kvido ĉiujn sprite prezentis), el kiuj minimume du devis esti strekitaj (alie la balotilo ne validis), ĉar nia komitato estas 7-membra. La sekreta balotado okazis en la tempo de tagmanĝo, do proksimume du

horojn, kiam ĉiu plenrajta kongresano povis ĵeti sian elekton en balotujon.

La posttagmezan programon komencis Kvido Janík per rezultoj de la balotado. En la balotujo estis 75 balotiloj, el kiuj nur unu ne validis (ĉar strekita sole unu nomo). La nova komitato konsistas el sep personoj, kiuj en sia unua kunveno poste disdividis la funkciojn jene: prezidanto - **Věra Podhradská**, vicprezidanto - **Lucie Karešová**, vicprezidanto - **Petr Chrdle**, sekretario - **Pavel Polnický**, kasisto - **Jindřich Ondráček**, komitatano pri kluboj - **Libuše Dvořáková**, komitatano pri sekcioj - **Jiří Tomeček**.

La resto de la posttagmeza programo estis dediĉita al du temoj, nome koncepto de la disvolviĝo de Esperanto-movado en Ĉeĥio (enkondukis Miroslav Malovec) kaj propagando de Esperanto (enkondukis Petro Chrdle). Vidu apartan artikolon.

La sabatan vesperon kronis danc-amuzo, enkondukita de akrobata rokenrolo (prezentis junularo el la sporta grupo Sokol Malá Strana) kaj per hunda danco laŭ irlanda muziko (Pavla Zemanová kun sia hundino). Jam tradicie ne mankis tombolo,

kies ĉefa premio estis torto kun verda stelo.

Dimanĉe antaŭtagmeze parto de la kongresanoj iris trarigardi la urbon sub gvido de profesia esperantlingva ĉiĉeronino Eva Hajíčková, dume konferencis membroj de la informadika sekcio (vidu apartan artikolon) kaj kunsidis la nova kontrolgrupo.

Rimarkigo de la redakcio:

Ĉar la legantoj eble ne konas la kvar novajn funkciulojn de ĈEA, ni prezentas ilian koncizan karakterizon:

Libuše Dvořáková (1953), klubanino de EK Svitavy ekde 1989, laboras en la Regiona Ofico - higiena ofico; antaŭe ŝi instruis Esperanton en baza lernejo en Svitavy (hobioj: turismo, ĝardeno).

Jiří Souček (1952), abituriento de ekonomia fako, laboras kiel salajra kontisto jam 22 jarojn (hobioj: turismo, urba trafiko, vojaĝado).

Věra Šlahařová (1954), klubanino de EK Znojmo ekde 1976, en 2002 transloĝiĝis al Ústí nad Labem, kie ŝi laboras en la Regiona Ofico.

Jiří Tomeček (1960), estras entreprenan merkat-fakon, kiel esperantisto laboris en junulara sekcio.

La kongresaj diskutoj

Jam tradicie akompanis la asocian kongreson ankaŭ alparoloj de aliĝintaj diskutantoj. *Josef Hron* substrekiis la neceson pliaktivigi klubojn kaj sekciojn kaj atentigis pri manko de lernolibroj por komencantoj kaj progresintoj. *Pavel Polnický* memorigis KELI-kongreson en Janské Lázně kaj sciigis, ke en



2004 ĝi okazos en Bystřice pod Hostýnem. *Miloslav Šváček* informis pri la agado de IKUE kaj pri la martira murdo de sekciano, pastro Cyril Vrbík. *Josef Vojáček* prezentis la agadon de la sekcio de informadiko. Pri fervojista sekcio parolis *Ladislav Špína*. En priskribo de la blindula sekcio *Jiří Vychodil* memorigis, ke Aŭroro aperas ekde

1920 jam en sia 75-a jarkolekto kaj ke nialande estas eldonata ankaŭ Esperanta Ligilo. *Jarmila Rýznarová* prezentis sukcesojn de AEH, precipe la kongreson en Janské Lázně kaj ekspozicion en Pardubice.

La diskutano posttagmezon pri strategiaj temoj enkondukis per kelkaj vortoj *Věra Podhradská* kaj gvidis *Lucie Karešová*.

Unue la vorton ricevis *Miroslav Malovec* por enkonduki la temon **Koncepto de disvolviĝo de E-movado en Ĉeĥio kaj la kluba vivo**. Li emfazis, ke la homoj kaj aranĝoj pasas, nur libroj, vortaroj, gazetoj, prospektoj, diskoj kaj kazetoj restas daŭraj. Ne kreskas nia membrobazo, sed kreskas nia kulturo. Kaj se ni volas kreskigi ankaŭ la membrobazon, necesas disponigi la kulturon al la publiko pere de la interreto, por ke ni povu post kelkaj jaroj proponi multe pli ol nun. Precipe la turismaj kaj enciklopediaj informoj pri nia lando estus efikaj.

La dua diskutanto *Miroslav Smyčka* pledis por la interna ideo de esperantismo, por nia preteco akcepti ankaŭ alian neŭtralan lingvon kaj por reeldono de la informaj broŝuroj de Oldřich Kníchal (Co nevíte o esperantu, Světadíl bez tlumočnicků). *Jiří Laube* kaj *Norbert Karbe*

aprobis la opinion de Malovec. *Josef Vojáček* priskribis klerigan kibernetikon kaj instruadon de studobjektoj en fremdaj lingvoj. *Josef Hron* prezentis sian laboron pri elektronika vortaro. *Lucie Karešová* subtenis ideon pri la turismaj informoj, kio helpus ankaŭ al la Pasporta Servo de UEA/TEJO.

La duan temon **Informado pri Esperanto kaj instruado** enkondukis *Petro Chrdle*. Li atentigis, ke estas strategia eraro paroli publike pri "propagando" de Esperanto (ĉiam pri "informado"), sed same malbone estas trudi la informojn al homoj. Multe pli efike estas paroli pri io interesa kaj nur preterpase menciis Esperanton. Nur kiam la homoj mem demandas, kio estas Esperanto, estas la informado efika. Persono, kiu mem prenas informan flugfolion, tralegas ĝin; al kiu oni ĝin enmanigis, tiu ĝin forjetos.

Zdenka Novotná menciis sian vojaĝon al Skotlando kun infanaj esperantistoj kiel ekzemplon de efika informado. Poste ŝi tralegis leteron de *Jiří Pištora*, ke en la muzeo de Česká Třebová konserviĝas la rezultoj de nia laboro por niaj posteuloj kaj ke ĉiu klubo tie povas deponi siajn memorindaĵojn. *Drahomír Kočvara* aludis, ke lia

komisiono pri informado kolektas eltondaĵojn el gazetoj kaj ĵurnaloj pri Esperanto (ilia nombro bedaŭrinde malkreskas), utiligas ilin por plua informado kaj fine deponas en la muzeo. Usona gasto *Chuck Smith* informis pri la reta enciklopedio Vikipedio, kiun li iniciatis ĝuste antaŭ unu jaro, kaj proponis, ke la informoj pri Esperanto turniĝu ĉiam al certaj celgrupoj, ekz. studentoj, instruistoj, korespondantoj ktp. *Vlastimil Kočvara* emfazis neceson, ke la informantoj mem regu Esperanton, parolu kaj skribu senerare en la propra gepatra lingvo, kaj proponis eldonadi dulingvajn turismajn prospektojn, anglajn-Esperantajn. *Jaroslav Pokorný* postulis tujan enkondukon de Esperanto pere de Unuiĝintaj Nacioj. *Jana Holcová* petis, ke en Starto aperu la listo de ĉeĥaj ZEO-j (objektoj kun nomoj Zamenhof aŭ Esperanto). *Linhart Rýznar* priskribis siajn informajn prelegojn en Germanio kaj diris, ke ni estu pretaj akcepti solvon ankaŭ per alia artefarita lingvo.

mm



Novaj honoraj membroj

Samideano **Zdeněk HRŠEL** naskiĝis kiel filo de muzikisto-esperantisto en Hradec Králové, kie li konatiĝis dum siaj gimnaziaj studoj kun profesoro Miloš Lukáš. Tial estas komprenebla afero, ke samideano Hršel laboras en la Esperantomovado ekde sia junaĝo. unue en sia naskiĝurbo Hradec Králové, poste en Brno. Multajn jarojn li estis sekretario de la Esperanto-Klubo en Brno, kie li estis la plej grava kunlaboranto de s-ano Josef Vondroušek. Ekde la j. 1988 li funkcias kiel prezidanto de la Klubo. Gravan spuron li faris en la Esperanta kulturo. Informiloj "Hradecano" kaj "Bulteno de EK Brno" estis multfoje ne nur preparitaj de li, sed eĉ tajpitaj. Kunlabore kun la universitata biblioteko li ellaboris katalogon de Esperanto-verkoj. En 1984 li iniciatis kaj gvidis laborojn super la novaj Esperanto-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta vortaroj kaj restis unu el la kunlaborantoj, kiam la vortaroj estis preperataj por preso. Grave li kontribuis ankaŭ dum la redaktado de "Historio de la Esperantomovado en Ĉehoslovakio" de S. Kamarýt, "Propra biografio de Karolo la Kvara" kaj "Cent jaroj de Esperanto-Klubo en Brno". Plurajn jarojn li kolektas bibliografion de la tutviva verkaro de Miloš Lukáš.

Samideano **Miloslav PASTRŇÁK** konatiĝis kun Esperanto dum siaj gimnaziaj studoj ĉirkaŭ la 1936, li lernis kiel memlernanto laŭ la lernolibro de T. Kilian. La ekzamenon pri la kapablo instrui Esperanton li faris kun eminenta

rezulto en la 1977. Li gvidis vicon da kursoj por komencantoj kaj por progresintoj, nun gvidas la konversacian rondeton de la klubo. Ekde la 1979 li laboras en la komitato de la Klubo de esperantistoj en Havířov. Plurajn jarojn li prizorgas kulturajn aferojn en la Klubo kaj protokolas klubajn kunvenojn. Li ofte prelegis - pri siaj vojaĝoj, pri Esperantaj eminentuloj, pri ĉeĥaj verkistoj. Li, kun sia edzino, grave kontribuis al la sukceso de entreprenoj de ĈEA organizataj en Havířov - precipe "Festotagoj okaze de la 20-a datreveno de ĈEA" aŭguste 1989, la 8-a kongreso de ĈEA aŭtune 1996, 40-jariĝo de la Esperantista Klubo en Havířov. S-ano Pastrňák eksterordinare zorgis pri la nevidantaj esperantistoj, por kiuj ekz. surbendigis Ĉeĥan-Esperantan Vortaron, trifoje instruis dum la someraj tendaroj por nevidantoj.

Kiel akurata kaj zorgema lingva spertulo estas ofte petata pri la lingvaj korektoj de la tekstoj preparataj por la publikigo. Ĉi tiu laboro, krom la zorgado pri la glata funkcio de la Klubo, estas nun lia ĉefa agado.

Samideano **Jiří PATERA** multjara esperantisto, unue membro de la klubo en Most, poste multajn jarojn en la Esperantista Klubo en Praha, kie li nun funkcias kiel prezidanto. Lia merito estas, ke regule aperadas Bulteno de la praga klubo. Kelke da jaroj li estis ankaŭ membro de la komitato de ĈEA. Dek jarojn li redaktis la asocian revuon "Starto". Krom la menciitaj funkcioj en la Klubo kaj la Asocio, ludas s-ano Patera

gravan rolon sur la kampo de tradukado el kaj en Esperanton. Oni povas mencii tradukon de la duono de rakontoj el la libro "Ne nur soldato Ŝvejk" kaj longan vicon da tradukaĵoj aperigataj ekz. en la praga Bulteno kaj aliloke.

Samideano **Jiří PIŠTORA** estas kunfondinto, en 1960, de la Esperanto-rondeto en Česká Třebová, kiu apartenas vicon da jaroj al la plej viglaj en Ĉeĥio. En la rondeto li fervore kaj sindoneme laboras senĉese ekde la j. 1960, kelkajn jarojn kiel prezidanto. Li estas unu el la kunfondintoj de la Tutŝtata Ĉeĥoslovaka Fervojistata Landa Asocio, en la j. 1965, kiu estis akceptita al IFEF la 26-an de majo 1965, dum la 17-a kongreso de IFEF en Hamar. Ses jarojn li funkciis kiel komitatano de IFEF. Li organizis plurajn entreprenojn por fervojistoj-esperantistoj, ekz. trajnan ekskurson de esperantistaj fervojistoj al Danio, Svedio kaj Norvegio en 1968, partoprenon de fervojista grupo en la 21-a kongreso de IFEF en Avignon, Francio, en la j. 1969. Multajn jarojn li aktive agadis en la landa sekcio de IFEF, precipe kiel distribuanto de la asocia revuo "Internacia Fervojisto". En la j. 1993 li fondis Esperantan sekcion en la Urba Muzeo en Česká Třebová, kie li nun estas direktoro de la muzeo. Fervojista.

Samideanino **Věra PODHRADSKÁ** renkontis unuafoje Esperanton en la jaro 1951, kiam ŝi lernis ĝin aŭtodidakte. Ŝi baldaŭ fariĝis membrino de la Esperanto-klubo en Brno, kie oni tiutempe solenis

50 jarojn de Esperanto en Brno. En la jaro 1952 ŝi partoprenis en la Esperanta Kolegio en Doksy, kie ŝi unuan fojon renkontis esperantistojn ekster sia "hejma" urbo. Ekde la jaro 1953 ŝi partoprenas en diversaj Esperantaj someraj tendaroj, ekde la jaro 1962 kiel instruistino. Ekde la jaro 1969 estas fidela al la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, kiel instruistino kaj en la estraro de la tendaro. Membrino de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio ŝi fariĝis tuj en la jaro 1969, kiam la Asocio estis fondita. Ŝi baldaŭ estis elektita en la Centran Plenumkomitaton de ĈEA. En la jaro 1979 ŝi estis elektita en la estraron de la Asocio, kie ŝi funkcias ĝis nun, nome en la Komitato de ĈEA. Ŝi plenumis en la asocia Komitato diversajn funkciojn, kiel vicprezidantino, kasistino, ekde la jaro 1999 ŝi laboras kiel prezidantino de la Asocio. Ŝi ne forgesas ankaŭ sian "hejman" klubon en Brno, kie ŝi laboris plurajn jarojn en la klubula komitato.



Samideano **Miroslav SMYČKA** unue kontaktis Esperanton dum siaj studentaj jaroj, ĉirkaŭ la j. 1945. En la j. 1960 li unuan fojon membriĝis en Esperanta klubo, nome en Opava, ekde la j. 1963 li estis membro de la Esperanta Klubo en České Budějovice kaj ekde la j. 1970 ĝis nun li estas aktiva membro de la klubo en Ústí nad Labem, kie plenumas funkcion de la prezidanto de la klubo ekde 1999. S-ano Smyčka estas tre konata ne nur en la ĉeĥa Esperanta medio, sed ankaŭ eksterlande, kiel fervora preleganto,

deklamanto, sed precipe kantisto. Per sia arto li riĉigis kaj riĉigas multajn Esperantajn kongresojn, festivalojn, konferencojn, kunvenojn kaj aliajn entreprenojn. El la longa vico estu nomataj almenaŭ: Universalaj Kongresoj en Londono, Beogrado, Roterdamo, Vieno, Varno kaj Prago; Kongresoj de IFEF en Ĉervia, Košice kaj Tábor; Kongresoj de SAT en Strážnice, Augsburg kaj Karlovy Vary; Kongresoj de GEA en Leipzig, Freital, Karlovy Vary, Mülheim kaj Lübeck; Kongresoj kaj konferencoj de IKUE (Olomouc, Kroměříž), KELI (Jánské Lázně), kulturaj festivaloj en Lesjöfors, Seifennersdorf, ktp.

Li estas longan vicon da jaroj ĉef-organizanto de kulturaj festivaloj, ĝis nun 15. en Ústí nad Labem, de antaŭ-kristnaskaj festoj kaj de Ĉeĥaj-Saksaj Tagoj, ĝis nun 22, plejparte en Ústí nad Labem.

ĈEA 1999-2002

(el la parolado de la prezidantino)

En Tábor estis elektitaj 7-membra komitato kaj 3-membra kontrolgrupo. Ĉiuj funkcioj estas honoraj (ne salajrataj). Post unu jaro la prezidanto de la kontrolgrupo rezignis, la alia membrino eĉ ne komencis labori pro familiaj motivoj, sekve Josef Hron restis sola, ĉar la tiama statuto ne ebligis kooptadon al la

kontrolgrupo. La komitato rekomendis s-ron Josef Mendl kiel kunlaboranton kaj nun dankas pro lia helpo.

Je sia funkcio rezignis ankaŭ la asocia sekretariino kaj kontistino Květa Krajíčková, anstataŭ kiu estis kooptita Pavel Polnický. La komitato kunvenis 16-foje laŭplane kaj 2-foje eksterordinare. La kunvenoj okazis en loĝejoj de la komitatanoj, nur antaŭ konferencoj en la konferencoj. Kiel gastoj estis regule invitataj la prezidanto de la kontrolgrupo, la redaktoro de Starto, la estro de Libroservo kaj la prezidantino de la pedagogia sekcio, neregule ankaŭ aliaj personoj laŭ bezono. Preskaŭ ĉiuj komitatanoj estis rete atingeblaj. Por rete atingeblaj asocioj la komitato dissendas "ret-komunikojn" (redaktas Petro Chrdle).

La programo de la komitataj kunvenoj unue kontrolis plenumadon de la antaŭaj taskoj, poste okupiĝis pri la asocia ekonomio, pri laboro de sekcioj, komisionoj kaj kluboj, pri kunlaboro kun aliaj asocioj, pri asocia organo Starto kaj Libroservo, preparis konferencojn, dediĉis atenton al instruado kaj disvolviĝo de la movado kun helpo de komputila tekniko, kio fine

respeguliĝis en la nova statuto.

La ĉefdelegiton de UEA por Ĉeĥio Stanislava Chrdlová prenis de ni insida malsano kaj ŝiajn devojn transprenis Lucie Karešová. Plie Lucie prilaboris Aktualan gvidilon de ĈEA kaj novan version de la statuto.

En la pasintjara septembro la komitato turnis sin al la dumvivaj membroj kun peto pri financa helpo, kaj kolektiĝis pli ol 40 000 Kč, pro kio ni dankas (same al tiuj, kiuj subtenas la asocion per donacoj ĉe aliaj okazoj). Ankaŭ la kupona privatigo helpas al la asocio akiradi certajn financajn rimedojn. Grave la asocion subtenas la firmao KAVA-PECH, kiu financis ekz. kunvenon de asociaj reprezentantoj el mez-eŭropaj landoj en Dobřichovice aŭ renkonton kun H. Tonkin en Prago, helpis ankaŭ mon-kontribuoj el IKUE-kongreso en Kroměříž kaj OSIEK-konferenco en Strážnice.

Inter la asociaj kongresoj realiĝis du asociaj konferencoj, nome en Znojmo 2000 (86 personoj) kaj en Poděbrady 2001 (85 personoj). Niaj reprezentantoj partoprenis ĉiujarajn konsiliĝojn de mezeŭropaj E-asocioj en Zagrebo 2000, en Dobřichovice 2001 kaj Rijeka 2002. Du niaj reprezentantoj ĉeestis HEA-

kongreson en Budapeŝto kaj unu GEA-kongreson.

Malgraŭ alparolo de la iamaj asocioj ni ne sukcesis kreskigi la membrobazon, ĉesis eĉ labori la junulara sekcio, ĉar la gvidantoj iĝis plenkreskaj kaj novaj ne venas.

Por informi pri la asocio aperis *Aktuální průvodce ČES*, kiu estos ĝisdatigita post la kongreso. Dank' al komitatano Jindřich Ondráček estis trovita nova deponejo por Libro-servo en Praha-Běchovice, kien estis transportita ankaŭ la asocia biblioteko (la regularo de pruntado en aparta artikolo). KAVA-PECH prizorgis presadon de *La Nova PIV*, eldonita de SAT.

Akorde kun la kongresa rezolucio el Tábor estis fondita sekcio de in-formadiko kun provizora prezidanto Josef Vojáček, kiu sukcesis ankaŭ establi E-kurson ĉe universitato Masaryk en Brno kaj akiri financon subtenon por la projekto. Sekciano Miroslav Malovec arkivigas E-literaturon en elektronika formo kaj kontribuas al la reta enciklopedio Vikipedio, sekciano Josef Hron laboras pri nova granda vortaro.

Pedagogia sekcio organizis paroligajn kursojn en Dobřichovice (30 personoj), Česká Třebová (17), Olomouc (20), Poděbrady (14). La

planita ĉijara decembra kurso estis ŝovita al februaro 2003. En Česká Třebová dum la kurso efektiviĝis ankaŭ la asociaj ekzamenoj "pri lingvoscio" (kvar kandidatoj, ekzamenis Josef Cink, Zdeněk Hršel, Miroslav Malovec). La korespondaj kursoj malgraŭ reklamo en la interreto ne alportis atendatan rezulton (2000 - 20 pers.; 2001 - 9 pers.; 2002 - 5 pers.; instruis D. Kočvara, A. Klementová, M. Tomečková). Infanrondetoj ekzistas en Česká Třebová, Okříšky, Praha, Ratíškovice. J. Melichárková kun M. Tomečková preparas ilustritan lenolibron por infanoj.

La katolika sekcio organizas somerajn tendarojn kaj renkontojn, ekskursojn eksterlanden, eldonas gazeton DIO BENU, kies elektronika versio disponiĝas en la interreto (grava ĉefe por nevidantoj). La kulmino estis ĉijara 55-a IKUE-kongreso en Kroměříž (167 personoj el 11 landoj). La sekcio planas bus-ekskurson al la 16-a ekumena kongreso (30.8.- 6.9.2003 Rimini, Italio). Ankaŭ la manlibroj kaj flugfolioj de la sekcio estas tre altkvalitaj.

La fervojista sekcio organizis kunlabore kun KAVA-PECH neforgesblan IFEF-kongreson en Tábor

kaj konferencon en Česká Lípa.

La blindula sekcio eldonas por siaj membroj la gazeton Aŭroro, organizas kursojn, prilaboras ankaŭ Starton kaj aliajn tekstojn aperantajn en elektronika versio.

KELI-sekcio aranĝis sian kongreson en Janské Lázně kaj preparas novan en Bystřice (2004).

La sekcio de kolektantoj ĉesigis sian agadon, la ceteraj sekcioj ne raportis.

Ni havas unu daŭran komisionon, nome pri informado kaj gazetaro, kiun gvidas D. Kočvara (kolektas ĉefe eltondaĵojn el gazetaro pri Esperanto), la aliaj komisionoj estas nomumataj nur okaze kaj por certa tempo.

La plej gravaj estas niaj kluboj. Kelkaj raportis pri sia agado (ekz. Pŕerov, Ostrava, Poruba, Havířov, Most, Olomouc, Brno, Mladá Boleslav, Česká Třebová, Svitavy, Prostějov, Znojmo, Třebíč, Plzeň), aliaj silentas. Multaj kluboj festis signifajn jubileojn: Brno 100 jaroj, Poděbrady 90 j., Olomouc 90 j., Česká Třebová 40 j., Znojmo 45 j., LET Lančov (Třebíč) 50 j. En Znojmo kaj Poruba estis plantitaj Esperanto-arboj (en Znojmo antaŭ la Domo de Infanoj kaj Junularo, en Poruba en parko antaŭ la gimnazio

Olga Havlová).

La tradiciaj Silvestro-tagoj en Česká Třebová estas konataj ankaŭ en eksterlando, simile kiel la Internaciaj Kulturaj Festivaloj kaj Ĉeĥaj-Saksaj Tagoj en Ústí nad Labem aŭ renkontoj sur la monto Čantoryja. Regule okazas "Adonido" en Ratíškovice, renkontoj en Šumperk, Svitavy, Přerov, Prostějov, Polička, Lanškroun, Pardubice (Esperanto-tago).

EK Znojmo aranĝis ekspozicion pri Esperanto en la loka arkivo por la publiko, kie ĝi restis pli ol unu jaron. Ekspozicioj aperis ankaŭ en Vyškov kaj Pardubice. En muzeo de Sušice kaj muzeo Komenio Přerov oni proponas esperantlingvan tekston. Faldfolio aperis pri Česká Třebová. EK Most sukcesis esperantigi la oficialajn interretajn paĝojn de sia urbo. En Strážnice okazis OSIEK-konferenco 2001 dediĉita al Karolo Piĉ. La OSIEK-premion akiris Eli Urbanová pro la romano Hetajro dancas (eldonis Fonto en Brazilo).

Kvindekjariĝon festis Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov, organizataj de EK Třebíč. La ĉefa merito apartenas al Pavel Sittauer. La festo okazis surloke en aŭgusto tuj antaŭ la inundoj.

Male tute nova aranĝo estas en Plasy.

KAVA-PECH organizas Ekorurismajn tagojn en Šumava, biciklistan renkontiĝon IBIRE kaj plej gravaj estas kolokvioj pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST 2000, KAEST 2002).

Bona estas ankaŭ nia kunlaboro kun AEH.

Por la venonta funkcia periodo estas preparataj jenaj aranĝoj:

- Komuna konferenco kun GEA en 2003 aŭ 2004
- 15-a internacia OSIEK-konferenco (aranĝas KAVA-PECH 19.-25.7. en Prago sub titolo "Intimaj temoj en la Esperanta beletro")
- Kunlaboro kun muzeo Karel Čapek kaj Olga Scheinpflugová en Strž apud Dobříš ĉe ekspozicio de fremdlingvaj tradukoj de Čapek (do ankaŭ en Esperanto) - 2003 (Margit Turková)
- Paroligaj kursoj, - la aŭtuna kun kurso por francaj fervojistoj.

Fine mi volas gratuli al la pragaj esperantistoj okaze de 100-jariĝo de ilia klubo kaj danki al la asociaj funkciuloj pro ilia trijara laboro.

Věra Podhradská



REZOLUCIO

La 10-a kongreso de ĈEA, okazinta en Praha de la 15-a ĝis 17-a de novembro 2002,

aprobas

- 1) raporton pri agado de ĈEA, raporton pri mastrumado kaj raporton de la Kontrolgrupo inter la 9-a kaj la 10-a kongresoj
- 2) komitatanojn por funkcioperiodo 2002-2005: Libuše Dvořáková, Petr Chrdle, Lucie Karešová, Jindřich Ondráček, Věra Podhradská, Pavel Polnický, Jiří Tomeček
- 3) la Kontrolgrupon: Josef Hron, Jiří Souček, Věra Šlahařová
- 4) la prezentitan novan statuton de ĈEA post akceptitaj modifoj (rigardu la aldonajon 1)
- 5) atribuas honoran membrecon al s-anoj Zdeněk Hršel, Miloslav Pastrňák, Jiří Patera, Jiří Pištora, Věra Podhradská, Miroslav Smyčka

taskas

- 1) la komitaton ekfunkciigi la bibliotekon de ĈEA
- 2) sekciojn kaj klubojn pli aktive

informi pri sia agado pere de Starto kaj ankaŭ pli aktive utiligi "liberan tribunon" en nia organo

- 3) pli atenti la agadon de sekcioj interalie per pli oftaj kontaktoj kun ili
- 4) intensivigi la informan agadon pri kaj per Esperanto

Estimataj gesamideanoj,

ĉar estas necese daŭrigi kaj labori, nova komitato kunsidos la 18-an de januaro en Brno. Dum tiu tempo jam komenciĝos en niaj EK kaj rondetoj jarkunvenoj, pro tio mi petas, sendu raportojn pri via agado, pri organizo de diversaj Esperanto-aranĝoj, pri ev. ŝanĝoj de korespond-adresoj (tiuj estas ankaŭ necesaj por prezenti en interreto). Pri kelkaj EK ni ne scias, ĉu ili funkcias, jam kelkajn jarojn. Diversajn aranĝojn ni volas publikigi en t.n. Kalendaro, por informi Esperantan publikon.

Fine al mi permesu, ke mi danku al estintaj komitatoj por ilia oferema laboro, danko ankaŭ apartenas al ĉiuj fidelaj kunlaborantoj, sed ankaŭ al vi ĉiuj, kiuj kiel ajn kontribuis al bona nomo de ĈEA kaj Esperanta movado. Al novaj komitatoj mi deziras multajn sukcesojn, sufiĉe da fortoj, optimismon kaj esperon al la laboro por Esperanto.

Ĉar proksimiĝas fino de la jaro 2002, mi deziras al Vi ĉiuj firman sanon, ĝojplenan Kristnaskon, feliĉportan kaj sukcesdonan novan jaron 2003.

Věra Podhradská

Český esperantský svaz

Stanovy

Čl. I

Název: Český esperantský svaz
(dále jen Svaz)

Ĉeĥa Esperanto-Asocio (v esperantu)

Sídlo: Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady

Působnost: Česká republika

Typ organizace: občanské sdružení

Jednací jazyky: čeština, esperanto

Čl. II

Poslání, cíle a činnosti Svazu

1. Poslání

Posláním Svazu je šířit mezinárodní jazyk esperanto jako prostředek pro mezinárodní komunikaci v souladu s ustanovením článků 2 a 7 Všeobecné deklarace lidských práv přijaté 10.12.1948 Organizací spojených národů.

2. Cíle

Cílem Svazu je:

2.1 zpřístupnit bohatství esperanta a jeho kultury českým uživatelům

2.2 šířit esperanto mezi českou veřejností

2.3 prostřednictvím esperanta šířit českou kulturu v zahraničí

2.4 zajišťovat činnosti vyplývající ze stanov Svazu.

3. Hlavní činnost

3.1 sdružovat zájemce o mezinárodní jazyk esperanto a rozšiřovat stávající členskou základnu

3.2 podporovat tvorbu slovníků, učebnic, internetových stránek a dalších učebních a pracovních prostředků umožňujících zájemcům přístup k celé slovní zásobě esperanta a k jeho kultuře

3.3 šířit esperanto a informovat o něm veřejnost tak, aby se mohla seznámit s posláním a cíli esperantského hnutí

3.4* napomáhat k proniknutí mezinárodního jazyka esperanto do nejrůznějších oborů lidské činnosti a společenského života

3.5 seznamovat veřejnost s výsledky své činnosti různými formami a prostředky v souladu s těmito stanovami

3.6 vydávat pro své členy a příznivce informační a kulturně zábavné časopisy a jiné tiskoviny, zejména učebnice a propagační materiály o esperantu a interlingvistice v češtině a v esperantu

3.7 rozšiřovat nákupem, prodejem a půjčováním esperantskou literaturu

3.8 provádět odborný výzkum, shromažďovat dokumentaci, statistické údaje a historické dokumenty týkající se esperantského hnutí

3.9 podporovat členy Svazu ve zvyšování a rozšiřování všeobecných a odborných znalostí v oblasti esperantského hnutí a interlingvistiky

3.10 pořádat kurzy, semináře, školení, odborné zkoušky a tematické akce ke zdokonalení jazykových znalostí členů i nečlenů Svazu

3.11 podporovat pořádání odborných a společenských akcí pro členy Svazu

3.12 vytvářet pro svoji činnost potřebné materiální a další zabezpečení.

4. Vedlejší činnost

4.1 organizovat vedlejší hospodářskou činnost za účelem získání prostředků pro naplňování cílů Svazu.

Čl. III

Organizační uspořádání

1. Orgány Svazu jsou:

1.1 sjezd Svazu

1.2 výbor Svazu v čele s předsedou

1.3 dozorčí rada

2. Složky Svazu jsou:

2.1 kluby esperantistů

2.2 sekce Svazu

2.3 komise Svazu

Čl. IV

Sjezd Svazu

1. Sjezd je nejvyšším orgánem Svazu.

2. Sjezd se koná nejméně jednou za tři roky a je svoláván výborem Svazu. Ze závažných důvodů a na žádost nadpoloviční většiny členů Svazu lze svolat mimořádný sjezd. Musí být svolán nejpozději do tří měsíců ode dne podání žádosti nadpoloviční většinou členů.

3. Sjezd řídí tří až pětičlenné pracovní představenstvo navržené výborem Svazu a schválené sjezdem.

4. Hlasovací právo na sjezdu mají všichni přítomní členové Svazu starší 18 let.

5. Další procesní otázky včetně způsobu hlasování jsou upraveny ve volebním řádu.

6. Sjezd je oprávněn:

6.1 schvalovat stanovy a jejich změny

6.2 volit výbor Svazu

6.3 schvalovat dozorčí radu

6.4 projednávat a schvalovat zprávu výboru Svazu o činnosti a hospodaření za uplynulé období a zprávu dozorčí rady

6.5 rozhodovat o návrzích a odvoláních předložených sjezdu k posouzení orgány nebo složkami svazu, pokud sjezd nepřeneše svou pravomoc na výbor svazu

6.6 rozhodovat o sloučení, rozdělení nebo zániku Svazu

6.7 schvalovat propůjčení čestného členství.

Čl. V

Výbor Svazu

1. Výbor je nejvyšším orgánem v době, kdy nezasedá sjezd Svazu.

2. Je výkonným orgánem Svazu a jeho pověření členové zastupují Svaz v jednání s fyzickými a právnickými osobami.

3. O počtu členů výboru rozhoduje sjezd.

4. V případě, že někdo ze členů výboru ukončí svoji činnost, výbor kooptuje dalšího člena výboru z členů Svazu. Počet kooptovaných členů nesmí přesáhnout počet zbývajících řádně zvolených členů výboru.

5. Výbor Svazu se schází podle potřeby zpravidla jednou za dva měsíce. Je usnášeníschopný, pokud je přítomna a rozhoduje nadpoloviční většina členů výboru. Při rovnosti hlasů je rozhodující hlas předsedy Svazu nebo v jeho nepřítomnosti hlas předsedajícího člena výboru.

6. Předseda je statutárním zástupcem Svazu a za svoji činnost je odpovědný

výboru Svazu. Jedna a táž osoba může vykonávat funkci předsedy max. dvě za sebou jdoucí volební období.

7. Výbor Svazu zejména:

7.1 svolává sjezd

7.2 po svém zvolení rozděluje funkce předsedy, dvou místopředsedů, tajemníka a dalších

7.3 rozhoduje o přijetí právnických osob a vyloučených členů Svazu

7.4 řídí činnost orgánů a složek Svazu

7.5 rozhoduje o organizačním uspořádání Svazu

7.6 stanovuje zásady spolupráce s dalšími organizacemi a rozhoduje o členství Svazu v tuzemských a zahraničních organizacích

7.7 vypracovává rozpočet na další rok a závěrečné vyúčtování uplynulého roku

7.8 schvaluje směrnice o hospodaření s majetkem a finančními prostředky

7.9 jmenuje redaktory svazového časopisu a případně dalších informačních médií Svazu a vymezuje jejich pravomoci

7.10 dle potřeby zřizuje sekretariát Svazu, který řídí pověřený člen Svazu a jehož činnost výbor kontroluje

7.11 schvaluje volební řád sjezdu

7.12 schvaluje příspěvkový řád

7.13 navrhuje sjezdu propůjčení čestného členství.

8. V letech, kdy se nekoná sjezd Svazu, výbor zpravidla pořádá konferenci Svazu. Na konferenci podává výbor zprávu o plnění úkolů Svazu za uplynulý rok a organizuje k ní diskusi. Informace o své činnosti podávají podle potřeby také další složky Svazu a jednotliví členové. Případné závěry z konference jsou doporučením výboru a dalším

organizačním složkám Svazu pro jejich činnost.

Čl. VI

Dozorčí rada

1. Dozorčí rada kontroluje činnost výboru a složek Svazu mezi sjezdy.

2. Dozorčí rada je navržena volební komisí a schválena sjezdem, kterému předkládá zprávu o své činnosti.

3. Dozorčí rada je tříčlenná. Předsedu, který řídí činnost dozorčí rady, si volí ze svého středu. V případě, že předseda nebo některý z členů ukončí svoji činnost v dozorčí radě, kooptuje do ní výbor Svazu jinou osobu z řad řádných členů Svazu.

4. Dozorčí rada provádí kontrolu hospodaření Svazu nejméně jedenkrát za rok a podle potřeby kontrolu hospodaření složek Svazu bez právní subjektivity. V klubech a sekcích esperantistů, které mají vlastní právní subjektivitu, provádí kontrolu, pokud o to požádá vedení nebo kontrolní orgán příslušné složky.

5. Dozorčí rada předkládá výboru zprávu o výsledcích revize hospodaření Svazu (jedenkrát ročně). V případě zjištění nedostatků navrhuje neprodleně opatření k jejich odstranění.

6. Přijímá stížnosti a podněty členů a složek Svazu, projednává je a podle potřeby prošetřuje a předkládá návrh na řešení výboru Svazu spolu se svým stanoviskem. O výsledku projednání podává zprávu předkladateli výbor Svazu. Dozorčí rada pojednává souhrnně o stížnostech a podnětech ve své zprávě pro sjezd.

ĈI. VII Kluby esperantistů

1. Kluby esperantistů se ustavují na základě zájmu v místech, kde jsou k tomu vhodné podmínky. V době registrace u Svazu musí mít minimálně pět řádných členů Svazu. Svou registraci se zavazují k naplňování stanov Svazu. Klub dle svého rozhodnutí může mít právní subjektivitu.

2. Orgány klubu esperantistů tvoří výroční členská schůze a výbor klubu v čele s předsedou.

3. Výroční členská schůze je nejvyšším orgánem klubu esperantistů, která se obvykle koná jednou ročně a zejména:

3.1 volí předsedu a další členy výboru

3.2 schvaluje zprávu výboru klubu o činnosti a hospodaření za uplynulé období.

4. Výbor klubu je volen výroční členskou schůzí a pracuje v době mezi výročními členskými schůzemi.

5. Předseda klubu zastupuje klub při jednání s fyzickými a právníckými osobami. Zpracovává a podává zprávy o činnosti klubu výboru Svazu.

6. K zániku klubu dochází:

6.1 rozhodnutím dvouřetinovou většinou členů klubu při výroční členské schůzi spolu s rozhodnutím, jak naložit s nabytým majetkem klubu

6.2 rozhodnutím výboru svazu, pokud klub nevyvíjí žádnou činnost po dobu delší než 24 měsíců nebo jeho počet klesne pod tři členy. V tomto případě přechází majetek klubu na Svaz.

ĈI. VIII Sekce Svazu

1. Sekce Svazu zřizuje výbor Svazu na základě zájmu členů Svazu. Sekce je složkou Svazu a dle svého rozhodnutí může mít právní subjektivitu.

2. Výbor svazu schvaluje organizační řád sekce, v němž je vymezena organizační struktura, cíle a činnosti sekce.

3. Orgány sekce tvoří konference a výbor sekce v čele s předsedou.

4. Konference je nejvyšším orgánem sekce Svazu, která se koná minimálně jednou za tři roky.

Konference zejména:

4.1 volí výbor sekce v čele s předsedou

4.2 schvaluje zprávu výboru sekce o činnosti a hospodaření za uplynulé období.

5. Výbor sekce je volen konferencí a pracuje v době mezi konferencemi. Výbor sekce podává zprávu o své činnosti výboru Svazu.

6. Za činnost a hospodaření Sekce odpovídá výbor sekce.

7. Předseda sekce zastupuje sekci při jednání s fyzickými a právníckými osobami. Zpracovává a podává zprávy o činnosti sekce výboru Svazu.

8. K zániku sekce dochází:

8.1 rozhodnutím dvouřetinovou většinou členů sekce při konferenci spolu s rozhodnutím, jak naložit s vlastními finančními prostředky sekce

8.2 rozhodnutím výboru svazu, pokud sekce nevyvíjí žádnou činnost po dobu delší než 24 měsíců nebo její počet klesne pod pět členů. V tomto případě přechází majetek sekce na Svaz.

Ĉl. IX**Komise**

1. Komise jmenuje výbor Svazu k zajištění specifických úkolů. Komise nemohou nabývat právní subjektivitu.
2. Komise mohou být zřízeny stálé nebo s časově omezenou působností podle povahy daného cíle nebo činnosti.
3. V čele komise stojí předseda, který je výboru Svazu odpovědný za činnost komise.

Ĉl. X**Členství**

1. Členem Svazu se může stát každý zájemce o esperantské hnutí, který souhlasí s posláním, cíli a stanovami Svazu. Členství ve Svazu je řádné, přispívající a čestné.
2. Řádným členem svazu se stane zájemce, který:
 - 2.1 je fyzickou osobou (ne právnickou)
 - 2.2 podá přihlášku
 - 2.3 zaplatí členský příspěvek a zápisné.
3. Členem Svazu se po schválení výborem může stát:
 - 3.1 právnická osoba (jako přispívající člen)
 - 3.2 dřívější člen Svazu, který byl v minulosti vyloučen.
4. Práva a povinnosti řádného člena
 - 4.1 Práva řádného člena jsou:
 - 4.1.1 užívat výhody plynoucí z řádného členství, zejména dostávat svazový časopis, být zvýhodněn na vložném při pořádaných akcích apod.
 - 4.1.2 volit a být volen do složek Svazu po

dosazení 18 let věku (do výboru sekce mládeže po dosažení 15 let věku)

- 4.1.3 uplatňovat vůči Svazu dotazy, připomínky a návrhy
- 4.1.4 domáhat se svých práv vyplývajících ze stanov Svazu
- 4.2 Povinnosti řádného člena jsou:
 - 4.2.1 řídit se stanovami Svazu a usneseními orgánů Svazu
 - 4.2.2 chránit zájmy Svazu a svazový majetek
 - 4.2.3 platit řádně členské příspěvky podle příspěvkového řádu
 - 4.2.4 zvyšovat svoje jazykové schopnosti v jazyku esperanto.
5. Přispívajícím členem se může stát fyzická i právnická osoba. Přispívající člen má stejná práva a povinnosti jako řádný člen vyjma povinnosti učit se jazyk esperanto a vyjma práva volit a být volen do složek Svazu.
6. Čestným členem se může stát občan České republiky nebo cizí státní příslušník, kterému čestné členství propůjčí sjezd Svazu za mimořádné zásluhy v rozvoji esperantského hnutí nebo interlingvistiky. Čestný člen má stejná práva a povinnosti jako řádný člen vyjma povinnosti platit členské příspěvky.
7. Členství ve Svazu zaniká:
 - 7.1 vystoupením člena
 - 7.2 vyškrtnutím
 - 7.3 vyloučením
 - 7.4 úmrtím
 - 7.5 zánikem Svazu.
8. Vyškrtnut může být člen, který nezaplatil členské příspěvky dvě po sobě jdoucí příspěvková období.
9. Vyloučen může být člen, který svým

jednáním a chováním poškodil zájmy Svazu nebo způsobil materiální újmu. O vyloučení člena rozhoduje výbor Svazu. Vyloučený člen je oprávněn se odvolat k sjezdu Svazu, který rozhoduje bez možnosti odvolání se. Do rozhodnutí sjezdu má vyloučený člen pozastavené členství.

Čl. XI

Majetek a hospodaření Svazu

1. Zdrojem příjmů Svazu a jeho složek jsou zejména:

1.1 členské příspěvky a zápisné

1.2 dary, subvence a příspěvky sponzorů

1.3 výnosy z hospodářské činnosti.

2. Svaz a jeho složky s právní subjektivitou hospodaří s vlastním majetkem a jsou oprávněny provádět vlastní hospodářskou činnost, získají-li k těmto činnostem živnostenské oprávnění.

Veškeré takto získané zdroje se stanou vlastnictvím těchto podnikajících subjektů, které je mohou využívat pro rozvoj své vlastní činnosti.

3. Dojde-li k ukončení činnosti a likvidaci majetku některé ze složek Svazu, bude tento majetek bezúplatně převeden Svazu, nedohodnou-li se zúčastněné strany jinak.

4. Funkce ve Svazu jsou v zásadě čestné. Členům výboru a dalším pověřeným členům hradí Svaz výlohy spojené s výkonem funkce. Za splnění mimořádných úkolů může výbor pověřeným členům výboru nebo Svazu přiznat finanční nebo věcnou odměnu.

Čl. XII

Zánik Svazu

1. Svaz zaniká usnesením sjezdu minimálně třípětinovou většinou.

2. Činnost likvidátora plní výbor Svazu nebo osoba, kterou na návrh výboru schválí sjezd Svazu.

3. Pohledávky a závazky přecházejí na právního nástupce v případě, že dojde k jeho ustanovení sjezdem, který rozhodl o zániku Svazu.

Čl. XIII

Závěrečná ustanovení

1. Právní záležitosti se řídí ustanoveními zákona č.83/90 Sb. o sdružování občanů občanským zákoníkem, pracovněprávními, finančními a dalšími obecně platnými předpisy.

2. Stanovy nabývají platnosti ode dne jejich schválení sjezdem a doba jejich platnosti se stanovuje na dobu neurčitou.

3. Ke změně stanov může dojít písemnou formou po jejich odsouhlasení sjezdem.

Změna stanov Českého esperantského svazu byla schválena 10. sjezdem Českého esperantského svazu v Praze dne 16.11.2002.



Konferenco de Sekcio de Informadiko (SdI)

okazis kadre de la 10-a kongreso de ĈEA la 17-an de novembro 2002, kiun partoprenis 10 personoj. La traktado okazis laŭ programo, kiu estis proponita en la pasintaj retaj informoj de SdI kaj akceptita sen ŝanĝoj kaj aldonoj kun la sekvaj rezultoj:

- Informoj pri la farita laboro - informis M. Malovec
- Aprobo de organiza regularo - laŭ statuto de ĈEA - artikolo VIII.
- Elektaj de komitato - laŭ proponoj kaj voĉdono de ĉeestantoj estis elektitaj ing. Josef Vojáček kiel prezidanto kaj Miroslav Malovec kiel vicprezidanto.

Laborplano kaj taskoj de la sekcio:

- Peri kontaktojn, kunlaboron kaj konsilojn al membroj de ĈEA por laboro per komputilo kaj el informadiko. (*Laŭ konkreta bezono spertaj membroj de la sekcio.*)
- Elektronika prilabor(ad)o de vortaroj kaj aliaj fakaj laboraĵoj: Nun estas preparata vortaro de ing. Hron.
- Elektronika prilabor(ad)o de beletro: Pri ĉi tiu tasko zorgas M. Malovec kaj liaj kunlaborantoj.
- Prepari helpilojn (i.a.

kompaktdiskon) por instruado de Esperanto en interreto. Tio estas pli longdaŭra tasko - ing. Vojáček provos engaĝigi studentojn enkadre de fakultataj E-kursoj, eventuale kiel temo de diploma laboraĵo. Kunlaboros ankaŭ ceteraj membroj de la sekcio.



- Prezento de Esperanto en interreto: Helpo por preparo de domajno esperanto.cz: Laŭ eblecoj ĉiuj membroj.
- Prezento de Ĉeĥio en interreto: Prepari E-versiojn de la TTT-paĝoj de urboj kaj/aŭ firmaoj en interreto, envicigo de turismaj informoj en Vikipedion. Ing. Vojáček preparas E-versiojn de TTT-paĝoj por Vyškova firmao Rostex.
- Prepari retroŝtliston kaj diskutejon de ĉeĥaj sekcianoj en la reto.
- Diskuto - okazis laŭbezone tuj al la unuopaj punktoj de la programo.

La sekva konferenco okazos minimume post tri jaroj enkadre de la sekva kongreso de ĈEA aŭ (pli bone) venontjare enkadre de konferenco de ĈEA. Kelkaj utilaj ret-adresoj (paĝoj kun * estas atingeblaj el VEB - eble ankaŭ aliaj):

<http://www.esperanto.net/veb/> Virtuala Esperanto-Biblioteko (VEB)

<http://eo.wikipedia.org/> * Esperanta enciklopedio

<http://home.wxc.nt/~lide/esperanto-adresaro> * Adresaro de esperantistoj kaj de Esperanto-organizaĵoj rete atingeblaj
<http://home.wxc.nt/~lide/paspserv.htm> *

Pasporta servo

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm> * IEMW, serckatalogo Trovanto

<http://www.uea.org/katalogo> * La plej ampleksa virtuala librovendejo kaj ties katalogo

<http://www.ais-sanmarino.org> * Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

<http://il.uniroma3.it/ilei> Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj

<http://il.uniroma3.it/kler> Kvazaŭlernejo de Tibor Sekelj

<http://www.edukado.net> Trarigardo de interesaj lerniloj por Esperanto

<http://www.esperanto.hu> Eventoj, ret-info kaj plena Esperanto-kalendaro

<http://www.komerco.com/itre> * Internacia Traduk-Reto pere de Esperanto

<http://www.kokosoto.org/EKursoj/default.asp> Kurso de Esperanto

<http://www.multimania.com/kosomo/ama-main.htm> Koresponda Servo Mondskala

<http://www.geocities.com/kalblando/altavist.htm> Sercilo kun Esperanta fasono
<http://traduku.net> Tradukprogramoj el angla esperanten kaj el E-o en aliajn lingvojn

Ing. Josef Vojáček

Esperantista klubo de Jiří Kořínek en Ŭstí n. L. (Ĉeĥio) kune kun E-asocio "Saksa Svisujo" (Germanio) okazigis sian

Ĉeĥan-Saksan Tagon

ligitan kun Zamenhofa omaĝo kaj adventa vigilio kaj okazintan sabate la 7-an de decembro 2002 en Urba muzeo en Ŭstí n. L. (apud Urba teatro) kun jena programo:

1. ekde la 9.30 h - Prelega matineo (prelegofertoj bonvenaj)
2. 12.45 - 14.15 - Komuna tagmanĝo en la restoracio "Na Rychtě" - la strato Klášterní
3. 14.15 - 15.45 - trarigardo de aktuala ekspozicio en Urba muzeo
4. 16.00 - Bunta kulturprogramo kun kantado, deklamado kaj instrumenta ludado - inkluz. de Zamenhofa omaĝo kaj komuna tradicia kantado de kristnaskaj kantoj. Krome okazis gaja lotado de tombolo sub Kristarbo. Mankis nek libroservo nek adventaj frandaĵoj.

KAEST 2002: Elektronikaj rimedoj

Jam la tria Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko okazis (8.-10.11.2002) en Dobřichovice, en la sama pensiono Sokol, kie antaŭ du jaroj gastis nia Paroliga Kurso. La kvardeko da partoprenantoj parolis bonan Esperanton, inter ili ankaŭ junaj homoj, kio tre esperigis kaj karesis la animon. Bedaŭrinde la preleganto de Bosnio Hercegovino ne sukcesis venki burokrataĵojn kaj ĝustatempe akiri la bezonatajn transitviziojn.

La konferenco komenciĝis vendrede posttagmeze per sekcio A (*Elektronikaj rimedoj*) kaj vespere per sekcio B (*Terminologiaj problemoj*). La terminologia sekcio okupis ankaŭ la sabatan antaŭtagmezon, dum la posttagmezo apartenis jam al la sekcio C (*Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tehniko*). Dimanĉe eksonis la lastaj prelegoj sekvataj de diskutoj ĉe "ronda tablo". Sabate vespere la konferencanoj buse forveturis al la kulturdomo Zahrada, por inaŭguri la ekspozicion, kiun post semajno vidis ankaŭ niaj kongresanoj. La solenan etoson emfazis kantoj de Josef Vích.

En 22 prelegoj la aŭskultantoj aŭdis pri duonaŭtomata tradukado en Esperanton, pri estontaj veturbiletoj similaj al la telefonkartoj, pri nul-energiaj domoj uzantaj la sun-energion, pri turismo, juro kaj vivomedio, pri regado de psikaj stresoj, pri politikaj tekstoj en Esperanto, pri solvado de ĉapelitaj literoj en

komputiloj kaj interreto, pri fungoj, plantoj kaj arbara leksikono, pri baraj-sistemo sur Danubo, pri matematika kaj ekonomia terminologioj en Esperanto, pri diagnozo de difektoj ĉe trajnoj dum veturado, pri diferenco inter planko kaj plafono, pri mikroproceziloj, pri prezento de Esperanto en interreto kaj Vikipedio, fine kiel savi manuskriptan postlasaĵon de forpasintaj esperantistoj.

La prelegaro aperos libroforme same kiel ĉe la du antaŭaj KAEST-oj.

-mm-

Sciigo pri RET Nekvasovy

Dum la tagoj de 11-a ĝis 21-a aŭgusto 2002 organizis Esperanto-Klubo Plzeň kiel ĉiujare nun jam 11-an Refreŝigan Esperantan Tendaron. Ĉi jare ĝi estis je unu semajno pli frue ol pasintjare. Partoprenis entute 21 personoj (14 geesperantistoj, 3 neesperantistoj kaj 4 infanoj). Ili estis ĉefe el Plzeň, sed ankaŭ el Strakonice, Kaznějov, Hradec Králové, Zruč nad Sázavou, Ostrava kaj pola Gliwice.

S-ano Sládeček prelegis kaj projekciis lumbildojn el Esperantaj agadoj de pasinta jaro kaj per siaj kantoj beligis ne nur regulan vendredan tendarfajron. S-ino Emilie el Gliwice prelegis pri sia restado en Usono. Ĵaŭde ni realigis aŭtoekskurson al Sušice al Muzeo de Šumava. Ĉiĉeronis nin muzeolaboristo kaj esperantisto s-ano Jiří Pěnek, dank' al kiu Muzeo eldonis serion de bildkartoj kun kvarlingva teksto, inkluzive de Esperanto.

J. Vomáčka, EK Plzeň

Půjčovní řád Odborné knihovny ĈES

1 Způsob půjčování knih

- 1.1 Knihy se půjčují **jen čtenářům Odborné knihovny ĈES** (dále **OK ĈES**), jimiž se mohou stát pouze členové Českého esperantského svazu, a zasílají se pouze na území **České republiky**.
- 1.2 Knihy se půjčují **pouze zasláním poštou**, doporučeným balíčkem, nebo doporučeným dopisem. Prezenční studium není možné, místnost knihovny pro to není způsobilá.
- 1.3 **Výpůjční doba je 30 dnů**. Prodloužení výpůjční doby je nutné dohodnout s pracovníkem zodpovědným za knihovnu a povoluje se jen v případě, že o knihu nemá zájem další čtenář.
- 1.4 **Výtisky**, které ĈES označí jako **mimořádně cenné. nebude možno půjčovat**. Je však možno, pokud to je technicky proveditelné, zhotovit jejich kopii. To za předpokladu, že zájemce uhradí náklady kopírování. V tomto případě se stává kopie jeho majetkem, smí ji však používat jen pro své studijní účely, nesmí ji dále rozmnožovat a poskytovat dalším osobám (viz autorský zákon!).
- 1.5 **Objednávky** knih se vyřizují **zpravidla dvakrát měsíčně**. Delší doba vyřizování je způsobena odlehlostí a horší dopravní dostupností knihovny.

2 Poplatky

- 2.1 Zájemci o vypůjčování knih z OK ĈES zaplatí před prvním půjčením **zápisné 100,- Kč**, které bude sloužit k úhradě základní reáie a případně k doplňování knihovny o nové publikace.
- 2.2 Při zapůjčení knih(y) zaplatí čtenář **skutečné poštovné, podle platného sazebníku České pošty**. Balné se neplatí, je to služba ĈES svým členům.
- 2.3 Při zhotovování kopií podle b. 1.4 uhradí zájemce **veškeré skutečné náklady za pořízení kopie**.
- 2.4 **Při ztrátě knihy** nebo jiného zapůjčeného materiálu musí čtenář **uhradit cenu ztraceného výtisku**. Bude-li nutno knihu objednat v cizině, zaplatí také poštovné. V případě, že zakoupení na knižním trhu již není možné, uhradí náklady na zhotovení kopie vč. vazby.

3 Všeobecné zásady práce s půjčenými knihami

- 3.1 Při práci s půjčenými knihami a jiným materiálem je nutno dbát, aby nedocházelo k jejich nepřiměřenému poškozování. Do knih je nepřípustné vpisovat poznámky, nebo "opravy".



Sorpeto kantis en Bretonio

Dum unu renkontiĝo de la infanĥoro "Jeřabinka", Esperante Sorpeto, de Fundamenta arto-lernejo en Opava ĝia ĥorestro suspiris, ke infanoj, kvankam jam kantis en pli ol dek landoj, ankorau neniaj kantis en Francio. Tiam mi rememoris la internacian medicinistan Esperantan konferencon, kiu okazis en Opava antaŭ kvar jaroj, kaj ĉefe la adiaŭan vesperon, dum kiu la franca familio Clopeau kantis belegajn bretonajn kantojn. Mi skribis leteron kaj rezulto estis belega rondvojaĝo de la ĉeĥa infanĥoro tra la tuta Bretonio.

Denis-Serge Clopeau kaj lia edzino Manjo trovis plej taŭgan personon, muzikistinon kaj esperantistinon Franjo Provost, kiu kiel ĉefa organizanto preparis sep koncertojn en bretonaj historiaj urboj kiel Saint Briec, Quimper, Brest kaj Vannes. En ĉiu loko francaj esperantistoj atendis ĉeĥan infanĥoron kaj post ĝia divido en familiojn sekvis provludo kaj vespera koncerto. Por ĉiu koncerto estis presitaj tre belaj afiřoj kaj duono da koncertoj okazis en antikvaj preĝejoj. Francoj senpage gastigis kvardek knabinojn kaj krom tio zorgis pri ekskursoj al maro. La kanthoro preparis tre belan programon inkluzive de du belsonaj ĉeĥaj popolaj kantoj, kiujn esperantigis por tiu ĉi celo Josef Cink. La rondvojaĝo okazis en la fino de oktobro kaj knabinoj travivis naŭ

belegajn tagojn. La franca publiko estis eminenta, sperta kaj tre ofte starante aplaudis. Ke la kantoj plaĉis, konfirmas la fakto, ke ĥoro disvendis ĉiujn muzikdiskojn, kiujn alportis. Infanoj forportis el Francio ne nur grandan motivon por la plua laboro, sed ankaŭ multe da travivaĵoj.

La ĥorestro post la reveno proklamis, ke tiu ĉi turneo apartenis al la plej bonaj en la historio de kanthoro. Sed plej grava afero estas, ke sen Esperanto kaj sindonemaj kaj gastigemaj bretonaj esperantistoj tiu sukcesa propagando de ĉeĥa muziko neniaj povus realiĝi. Por ĉeĥaj knabinoj tio estis unua kontakto kun Esperanto kaj mi esperas, ke ankaŭ ne la lasta. Laŭ mia opinio unu tia evento estas por nia movado pli utila ol disvendo da centoj glumarkoj kun surskribo "Esperanto ponto inter nacioj".

Jiři Caletka, Opava

La infana kanthoro dum unu el multaj ekskursoj al maro.



Internacia kultura festivalo 2002 en Ústí nad Labem

La 15an Internacian kulturalan festivalon aranĝis - dum la tagoj 5a-7a de oktobro 2002 - Esperanto-klubo de Jiří Kořínek en Ústí nad Labem. La celo de la jam tradicia kultura evento estas firmigo de la internacia kunlaboro inter la ĉeĥaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj uzo de la internacia lingvo Esperanto por prezento de muzika kaj literatura artaĵoj, aparte ĉeĥ-devenaj. La festivalon partoprenis ĉ. 40 geesperantistoj.

La vendredan amikan renkontiĝon de la partoprenantoj sekvis la ĉefaj programpartoj sekvantan tagon. En la prelega matineo prezentis Prof. D-ro Vlastimil Novobilský literaturan verkon de D-ro Tomáš Pumpr, rekonata tradukanto de elstaraj ĉeĥaj literaturaĵoj en Esperanton, okaze de la 30a jubileo de lia morto. La prelegon kompletigis specimenoj el lia verkaro far Mgr. Věra Novobilská kaj Miroslav Smyčka. En la sekva prelego D-ro Zdeněk Rusín parolis pri la modernaj metodoj de tradukado kaj tuŝis eblecojn sekvantajn el ili por la traduklaboro de esperantistoj. La tria parto de la matineo estis dediĉita al unuhora videofilmo pri la Universala Esperanto-kongreso en Fortaleza, Brazilo, preparita far geedzoj Dvořák.

Sabate posttagmeze okazis en la preĝejo de S-ta Paŭlo homaranisma spirita koncerto sub titolo "Toleremo inter religioj", dum kiu eksonis muziko kaj

arioj ekde lia jarcento en la prezento de K. Kudlíková, H. Janiczková, M. Smyčka kaj V. Urban (orgeno). La tekstojn en Esperanton tradukis J. Kořínek, T. Pumpr, J. Filip, J. Giessner, J. Fousek kaj J. Bennemann.

La ĉefa festival-programo estis la vespera koncerto plena je muziko kaj poezio, kiu fariĝis por la ĉeestantoj neforgesebla travivaĵo. Ili povis ĝui operariojn (G. Gershwin, Ch. Gounod, A. Dvořák, G. Verdi, F. Flotow, B. Smetana), operetariojn (E. Kunnecke, R. Friml, J. Strauss), kantojn (T. Baranski, C. Franck, A. Šeremetev, E. Grieg, P. Musorgskij), klasikan instrument-muzikon (P. I. Ĉajkovskij, A. Dvořák, M. Glinka) kaj poezion (K. J. Erben, J. Neruda, J. Kořínek) en la prezento de K. Kudlíková (soprano), M. Smyčka (baritono), A. Proklov (baso), D. Tarantová (soprano), V. Urban (fortepiano), A. Nikitin (fortepiano), Z. Urbanová (violono), V. Urban, jun. (violonĉelo), T. Urbanová (fortepiano) kaj V. Novobilská (recitado).

Dimanĉa vizito de la kastelo en Velké Březno fariĝis la lasta programero de la jam tradicia kultura festivalo en Ústí nad Labem, pri kiu tre pozitive raportis la loka tag-jurnalo.

Josef Kříž



Tomáš Pumpr (1906-1972)

Antaŭ tridek jaroj forpasis akademiano JUDr. Tomáš Pumpr, opiniata de multaj la plej granda ĉeĥa esperantisto. En la Esperantan kulturon li enskribiĝis precipe per siaj majstraj tradukoj de poezio, operoj kaj ankaŭ prozo: *Bukedo* (K. J. Erben), *Majo* (K. H. Mácha), *Reĝo Lávra*, *Bapto de caro Vladimir* (K. Havlíček Borovský), *Vendita fianĉino*, *En la puto* (K. Sabina), *Najado* (J. Kvapil), *Sileziaj kantoj* (P. Bezruč - parte), *Milito kontraŭ Salamandroj* (K. Čapek - dua parto) k.a. Li ankaŭ prilaboris katalogon de tradukoj el la ĉeĥa kaj slovaka literaturoj.

La plej grandan famon kaj admiron li akiris per sia traduko de *Bapto de caro Vladimiro*. Konservigis kvar variantoj, kiuj montras, kiel la traduko evoluis dum pli ol dek jaroj (bedaŭrinde mankas precizaj datoj). Kiam la tradukon eldonis en 1953 Regulo Pérez sur Kanariaj Insuloj, kelkaj esperantistoj koleris, ke la poemo ofendas religion, kaj postulis likvidi la tutan eldonon. Por aliaj ĝi elpelas negocistojn el la Dia domo, kiel faris ankaŭ Kristo mem. En Ĉeĥoslovakio estis problemo akiri kelkajn ekzemplerojn, ĉar la ŝtato ne

volis foruzi valutojn por esperantistoj. Ĝis nun la traduko estas admirata pro sia virtuozece. Ni provu kompari unu strofon en ĝia evoluo (Havlíček, Kamaryt kaj kvar versioj de Pumpr):

Jedna hora vysoká je
a druhá je nízká,
kdo nemá své muzikanty,
na hubu si píská.

Unu monto estas alta,
dua monta fuŝo.
Kiam mankas muzikantoj,
fajfu per la buŝo!

Unu monto altas ete,
unu ĉieltuŝe,
se ne estas muzikistoj,
oni fajfas buŝe.

Unu monto altas ete,
dua ĉieltuŝe.
Kiam mankas muzikistoj,
oni fajfas buŝe.

Jen montego staras alta,
jen monteto estas -
Ne havante muzikbandon
oni buŝ-trumpetas.

Unu mont' al nuboj kreskis,
unu kreskis fuŝe -
iu havas muzikbandon,
iu fajfas buŝe.

(R)estu membro de la Esperanto-komunumo!

Mi volas rediri al vi, kial indas esti kaj resti membro de la E-komunumo. Esence al la ĉiama demando: "Kial finfine mi devus aliĝi al la loka Esperanto-klubo, al la nacia landa asocio, al la asocio de mia fako aŭ hobia, al UEA?" mi kutimas respondi, ke ekzistas almenaŭ du kialoj:

1) La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio; mallonge dirite, ili laboras por lingva demokratio. Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al monda, nacia aŭ faka asocio (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda E-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj kiu provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

2) Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj, koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membro de Esperanto-asocioj faras des pli nature, estante daŭre informataj per siaj asociaj ligoj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-ebloj je sia dispono. Kaj se vi apartenas al la komunumo de tiuj, kiuj normale ŝaltas sian

komputilon antaŭ la matenmanĝo, vi trovos (aŭ jam trovis), ke esperantistoj ĉeestas pli kaj pli en la tutmonda reto kaj serĉas kontaktojn kun similaj esperantistoj. La avantaĝoj de asocia membreco estas similaj ankaŭ ĉi-kaze. Ekzistas diversaj diskutgrupoj por UEA-membroj, ekzemple, kaj nuntempe ankaŭ eksperimenta eblo ricevi la revuon Esperanto per Interreto en komputila formato.

Do estas grave, ke vi klopodu aliĝi al Esperanto-organizaĵoj je ĉiuj niveloj (loka, landa, faka aŭ internacia). Ni kompreneble invitas vin aliĝi aŭ re-aliĝi al UEA, sed ankaŭ se vi aliĝas nur al faka asocio aŭ al via loka klubo, tio jam estas io bona; kaj se vi aliĝas ankaŭ al via landa asocio, tio estas io ankoraŭ pli bona, ktp.

UEA pretas ĉiukaze sendi al aranĝantoj de naciaj aŭ lokaj renkontiĝoj stokon da revuoj de UEA de la pasinta jaro kune kun cirkuleroj por disdonado al la partoprenantoj - oni devas tiurilate nur peti la Centran Oficejon. La celo de nia kampanjo estas "vastigi la komunumon", tio estas vastigi la nombron de organizitaj kaj interligitaj esperantistoj je ĉiu nivelo. Nia ĉefa celo estas ke la membroj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj pliiĝu kaj estu en kontakto inter si. Oni vastigas la komunumon ĉefe per informado pri Esperanto kaj instruado de Esperanto, sed ankaŭ tio estas senefika en la longa daŭro, se la parolantoj de Esperanto ne poste iel restas kune.

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA
Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:
Lucie Karešová (vidu p. 98)



Nia filmo al 100-jariĝo

1. Elena Puchova kun infanoj prezentas operon La Eta Princo
2. Zdeněk Heiser instalas la ekspozicion pri 100 jaroj de Esperanto ne nur en Prago
3. Angulo de la ekspozicio kun busto de Zamenhof kaj kroniko



Masaryk-Akademio de Artoj

atribuis la 7. 11. 2002 premion por la artisma agado al d-ino Zdenka Bergrová, kies poemaro Vortoj de la nokto ĵus aperis en E-traduko de J. Mráz. Ŝia verkaro konsistas ĉefe el tradukado de rusaj klasikuloj (Nekrasov, Dostojevskij, Puŝkin k.a.)

PARDUBICE

En la regiona biblioteko en Pardubice okazis de 1. - 30. 11. 2002 ekspozicio "Kio estas Esperanto kaj kiel eluzi ĝin". La ekspozicion preparis la membroj de la Klubo de esperantistoj de Dr. Schulhof kaj de Asocio de E-handikapuloj.



VÍTKOVICE

Kluba programo: 8.1.2003 Aŭstralio (Ing. J. Suchánek), 22.1. Černá hora (V. Sládeček), 29.1. Jarkunveno, 12.2. Aŭstrio (D. Kočvara). En Hlučín kelkaj aktivaj esperantistoj intencas fondi klubon.

Ni kondolencas

- la 15-an de julio 2002 forpasis **RNDr. Evžen Wohlgemuth** (55j.) el Brno, zoologo

- la 22-an de oktobro 2002 estis murdita katolika pastro, nia IKUE-ano, **Cyril Vrbík** (75j.) el Dub nad Moravou, fare de 28-jara satanisto, kiu poste sin mem anoncis ĉe polico.

- ekzempleroj de Startoj kun mencio "la adresato forpasis" revenis de la membroj: **Jiřina Bubeniková** el Olomouc, **Augustin Vlach** el Hradec Králové, **Jarmila Dufková** el Brno, **Olga Ungerová** el Neratovice.



*Venu
Via
Regno*

Ni proponas senpagan

**BIBLIAN
STUDKURSON**

Se mankas al vi Biblio,
ni, senpage provizos Biblion.

*Via Vorto estas lumilo
por miaj piedoj
Kaj lumo por mia vojo.
Psalmo 119:105*

INTERNACIA BIBLIO-MISIO
50 Wissage Road, LICHFIELD
WS13 6SW Anglio.

Ni gratulas

La 21-an de decembro 2002 ĝisvivas sian naŭdekjarigon s-ano Karel Blažek, Mnichovo Hradiště, oferema membro de la loka klubo, en plena sana kaj korpa freŝeco. Multajn pluajn jarojn plenajn de sano kaj vivkontento!

MUDr. J. Hradil

Korespondi deziras

27-jara kubana junulo instruas Esperanton al 9-12-jaraj infanoj: Jose de J. Campas Pacheco, calle 10 %29y31 escl 2908 piso 3 apt F-6, Pedro Betancourt - Matanzas, Cuba 42700

Mladá Boleslav

Informoj pri Mn. Hradiště en urbaj paĝoj, Esperanta teksto en [www de Muzeu ŠKODA-AUTO](http://www.muzeu.skoda-auto.cz), legolibreto por komentantoj kun facilaj tekstoj.

Ostrava-Poruba

Bildpoŝtkarto de Ostrava, Arbo de milenio, preparita bildriĉa lernolibro, eldonitaj du kasedoj kaj unu kompakta disko (kantoj). Tricent libroj en la kluba biblioteko. Libro el Brazilo ĉeĥigitaj cirkulas jam tra Ĉeĥio kaj Slovakio kun surskribo: Tradukita el Esperanto. Libro "Feliĉa vivo" ĉeĥigita el Esperanto aperis en Brazilo. Por asocio de liberpensuloj tradukitaj tri libroj el Esperanto (SAT-eldonejo), kompilita libro "Gruzoj" kun ŝercoj kaj por varbado en nia lando libro "Pokalo de senmorteco" pri tri esperantistoj en germana militkaptiteco.

KALENDARO 2003

februaro Paroliga kurso

februaro Ekspozicio de esp. Gazetoj (Kinejo Metro en Prostějov)

19.-25.7. OSIEK-konferenco

Jak platiť svazu

Nejlevnější způsob platby pro Vás i pro svaz je přímá platba u pokladny v kterékoliv pobočce Komerční banky. Vyplníte pokladni složenkou (jsou v pokladně k dispozici) pečlivě ve všech kolonkách (viz vzor Starto 2/2001, str.67) - tedy: měna účtu: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, měna hotovosti: Kč, částka: slovy kolik platíte, jméno a příjmení, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenový seznam. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v. inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379. Seznam čísel:

06940 ČES

06941 UEA

06942 předplatné Starta bez členství

06943 dary ČES

50100 sekce mládeže

50200 sekce železničářů

50400 sekce pedagogická

50401 písemný kurs začátečníci

50402 písemný kurs pokročilí

50403 členství ILEI

50404 Paroliga kurso

50405 svazové zkoušky

50500 sekce přátel SAT

50600 sekce šachistů EŠLI

50700 sekce sběratelů

50800 sekce nevidomých LIBE

50900 sekce zdravotníků UMEA

51000 sekce křesť. esp. KELI

51100 sekce katol. esp. IKUE

70100 komise pro tisk a inf.

80200 ediční fond

80300 propagace v tisku

80400 fond Tilio

Pokud jste poukázali platbu a nejste si jisti, zda jste řádně vyplnili své jméno, napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.



OSIEK-PREMIO 2002

En 2002 la OSIEK-anoj proponis 21 verkajojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*. La 26an de julio, dum la IEK en Leuven, Belgio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Krešimir BARKOVIC

pro traduko de:

7000 Tagoj en Siberio de K. Štajner

Gratuloni!

La premio, 500 eŭr., rekomencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkajo ne tlika aŭ pro grava traduklaboro.

Invokizo de Mэгumi Sacha-Komamura Informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuè, Francio kaj <http://osiek.org>

**Periodikum Českého esperantského
svazu (32. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
malovec.starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:
Pavel Polnický, ČES**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(32-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ
rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 9 eŭroj
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, e-mail:
malovec.starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto**

Presis: OPATISK Opava

ISSN 1212-009X

